



MIA TAGLIBRO PRI LA DUA INTERNACIA JUNULAR- KUNVENO EN BELGUJO (Tervuren, 7-14 Aŭg. '39).

(la lastan tagon de la TJO-kunveno).

Posttagmeze ni iras al Hoeilaart, viziti la vinberujojn. Fremda sinjoro gvidas nin tra ĝis nun nekonata parto de la arbaro: Kapcienen Bosch. Laŭlonge marĉoj, kampoj, trans malnovaj pontetoj, ni brak' en brako promenas. Kiom malgrandaj ni estas inter tiaj altaj arboj! Mirinde, ili ĉiuj estas rektaj kiel grandegaj alumetoj. Ni ĝuas la belecon de l'naturu. Mi plu ne rememoras kial, sed mi promenas sola. La aliaj pasas, pasas, mi rimarkas, ke mi preskaŭ estas la lasta, de la tuta grupo. Strangaj ideoj denove kaptas min. Denove la adiaŭo ombrumas mian cerbon. Mi preskaŭ ne povas kredi, ke morgaŭ je ĉi tiu horo la tuta semajno jam pasis, ke disigitaj ni denove sekvos la vivovoĵon. Morgaŭ staros la materia vivo antaŭ ni kun ĝiaj zorgoj, ĉagrenoj, minacoj. Nun mi jam povas imagi, ke mi povos deziri ĉeesti alian junularkunvenon! Sed ĵaro devos forpasi, kaj kio ne okazos dume! La grupo haltas ĉe la rando de la arbaro. Mi retrovas la aliajn. Feliĉe, ĉar mi certe iĝus pesimisma. Ni sidiĝas en la herbo. Malsupre kuŝas la vilaĝo Hoeilaert.

Vespere ni iras al la festsalono Lastfoje ni eniras ĝin. En mia cerbo nur ŝvebas la vorteto: lasta, lasta Nia grupo sidas kune. S.ro Kryt aperas sur la scenejo. Li rememorigas al ni, ke la lasta vespero komenciĝas. La grupo el Koedyk denove dancas. La danco „Interkonatiĝo” ege plaĉas al mi. Jen estas nia angla kantistino. Ŝi kantas „Donkey Serenade”. Ŝi ree devas kanti. Valson ŝi kantas. Post la angla fraŭlino aperas angla knabo: li dancas, kaj dum la dancado li lerte faras kelkajn akrobataĵojn. S.ro Kryt demandas, ĉu neniu deziras diri kelkajn vortojn, sed neniu ekstaras. Subite S.ro Symes aperas. Li rakontas historion. Liaj gestoj tute harmonias kun la vortoj. S.ro Kryt denove aperas. Mi nur timas, ke li fermos la vesperon. Sed ne, feliĉe ne. Ni komune kantas nian marŝkanton kaj „La Espero”. La kantado komenciĝas, sed ne eblas al mi kanti kun la aliaj. Kiom malplena mi sentas min. — Jam oni kantas „La Espero”. Mi ne rajtas pensi pri la adiaŭo, aŭ mi denove malfortiĝos. La vespero ankoraŭ ne finiĝis. La anglaj fraŭlinoj fermos la vesperon. Ili fermas la lastan vesperon, kaj kantas al ni: „Ĝis revido, ĝis revido.” Nun mi plu ne estas mi mem. Aŭdante „Ĝis revido ĝis revido” ŝajnas al mi, kvazaŭ la tero malaperas de sub mi. Neniam en mia vivo adiaŭo kortuŝis

min tiel-profunde. Malforta mi estas ege malforta, sed kontraŭ tio ne eblas fari ion. Poste mi trovis, ke estas iomete infane, ke junulo ploras, sed mi esperas, karaj geamikoj, ke vi komprenas mian tiaman animstaton, ĉar ankaŭ vi certe sentis ion ĉagrenigan, ion kortuŝegan en via koro. — La lasta vespero finiĝis. Ĉie mi aŭdas adiaŭajn vortojn. „Ĝis revido” resonas en la salono. — Sola mi eliras

Roger Cosijns.